

Konkurso pri emblemo de Infana Universitato

La Estraro de ILEI alvokas kreemulojn, esperantistajn kaj neesperantistajn, membrojn aŭ ne-membrojn de ILEI, proponi emblemon de Infana Universitato – programo okazonta dum la Kongreso de ILEI. La esperantistoj estas bonvenaj kaj mem partopreni la konkurson kaj proponi ĝin al siaj konatoj – spertuloj pri grafika aspektigo kaj al lernantoj kaj studentoj de tiu fako en mez- kaj altlernejoj kaj universitatoj.

Difinoj kaj kondiĉoj

1. La *Infana Universitato* (IU) estas eduka, kultura kaj amuza programo por infanoj partoprenantaj Kongreson de ILEI kun siaj gepatroj aŭ instruistoj. Ĝi povas okazi ankaŭ dum aliaj Eo-eventoj, aŭ memstare. Ĝi ampleksas vartejon-ludejon, amuzajn lecionojn, sportajn ludojn, konkursojn, ekskursojn kaj aliajn programerojn adaptitajn al lernejoj kaj antaŭlernejaĝaj infanoj.
2. La emblemo kiel grafika simbolo de *Infana Universitato* devas esprimi ĝiajn esencon kaj etoson simplamaniere, elegante kaj ideoveke, sen teksto krom la akronima siglo IU.
3. La emblemo estu taŭga por kolora preso kaj nigra-blanka kopio, uzebla en kapteksto de leterpapero, sur dokumentujoj, porokazaj kovertoj, informiloj, aliĝilo, glumarkoj, insignoj k.s.
4. La konkursaĵo en ciferecaj formatoj JPG kaj PNG estu sendita al radojica.petrovic.rs@gmail.com, kopie al ilei.sekretario@gmail.com, kun mesaĝtitolo *Emblemkonkurso de IU*.

Taksado, elekto kaj premioj

La Estraro de ILEI nomumos fakan ĵurion por pritakso de la konkursaĵoj, kiu proponos elekton de la plej bonaj proponoj, eventuale sugestante al la aŭtoroj plibonigajn modifojn. La Estraro konsideros la raporton kaj proponojn de la Ĵurio kaj findecidos pri la uzota emblemo kaj premiindaj verkaĵoj. La premioj por la unua, dua kaj tria loko konsistos el diplomo, E-libro kaj abono al ILEI-periodaĵo aŭ kotizo por iu ILEI-evento.

Limdatoj

1. Sendo de konkursaĵoj: 2017-03-31
2. Raporto de la ĵurio: 2017-04-20

3. Informo al la aŭtoroj kun sugestoj pri modifoj: 2017-04-30
4. Sento de modifitaj konkursaĵoj: 2017-05-15
5. Definitiva raporto de la ĵurio: 2017-05-31
6. Definitiva decido de la Estraro kaj ĝia publikigo: 2017-06-15

Publikigo

La decido estos komunikita al la aŭtoroj kaj publikigita tra E-movadaj komunikkanaloj kune kun informo pri maniero kaj tempo de transdono de la premioj.